FEBRUARO 2011

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN

# La Espero

2011:1

# Pri informado, kongreso kaj multo alia






## Lingvo-kafejo

Grave estas diversmaniere informi pri Esperanto. Supre Olof Pettersson kaj Robert Smeds informas en lingvo-kafejo en Nacka.
Foto: Robert Smeds

## Sveda Esperanto-Kongreso

Maldekstre vi vidas la ŝipon Af Chapman en Stokholmo. En tiu ĉi numero de La Espero estas multaj artikoloj rilataj al la kongreso.
Foto: Olof Pettersson.

## Tiberio Morariu



Estis rumano, kiu instruis Esperanton en Svedio. Legu pri lia vivo en paĝo 7.

## LA ESPERO

**Organ för Svenska Esperantoförbundet**
ISSN 0014–0694
Februaro 2011 • 99-a jarkolekto
Fondita en 1913
**Redaktion:** Leif Nordenstorm och Olof Pettersson
**Frågor om prenumeration, adressändringar o. dyl.:**
EsperantoCentro, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm, tel. 08–34 08 00. sveda@esperanto.se
**E-post:** laespero@esperanto.se
**Ansvarig utgivare:** Leif Nordenstorm
**Utformning:** Omnibus Typografi & Leif Nordenstorm
**Tryck:** Pingvinpress Grafiska AB
**Prenumeration 2011:** 200 kr.
Prenumerationsavgift för La Espero ingår i medlemsavgiften.
Postgiro 20 12–3, Esperantoförbundet.

## ESPERANTOFÖRBUNDET

**Adress:** Esperanto-Centro,
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
tel. 08–34 08 00
**E-post:** sveda@esperanto.se
**Nätsida:** www.esperanto.se
**Öppettider:** Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!
**Postgiro:** 20 12–3, Esperantoförbundet
**Medlemsavgift 2011:**
Direktansluten medlem 200 kr.
Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.
Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av La Espero.
Tilläggsexemplar kostar 100 kr/år).

## ESPERANTOFÖRLAGET

**Adress:** Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
**Postgiro:** 578–5 **Nätsida:** www.algonet.se/~eldona
**E-post:** eldona@telia.com Telefon: 070-5850054

## ESPERANTOGÅRDEN

**Adress:** Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors,
**Nätsida:** www.esperanto.se/medlem/eogarden
**E-post:** egarden@esperanto.se
**Telefon:** 0590-309 09

### Manus till La Espero

**sänds till** Leif Nordenstorm, Bellmansgatan 42, 2 tr, 754 26 UPPSALA, tel. 018-24 43 01
e-post: laespero@esperanto.se

| | *Stoppdatum* | *Utkommer senast* |
|---|---|---|
| Nr 1 | 15 januari | 15 februari |
| Nr 2 | 28 februari | 30 mars |
| Nr 3 | 30 april | 31 maj |
| Nr 4 | 15 augusti | 15 september |
| Nr 5-6 | 31 oktober | 30 november |

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.


## NI PREZENTAS

# Katalin Kováts

**la Esperantisto de la Jaro 2010**



*Kie vi naskiĝis?*
Mi naskiĝis en Hungario, en familio kie de pluraj generacioj preskaŭ ĉiu estis instruisto.

*Kie vi loĝas?*
De 2001 mi loĝas en Hago, Nederlando, kun mia franca edzo kaj nia kvarlingva fileto Martin.

*Ĉu inter la kvar lingvoj estas ankaŭ Esperanto?*
Jes, ĝi estas la komuna familia lingvo kaj la lingvo kiun ankaŭ miaj pli aĝaj gefiloj, loĝantaj en Hungario uzas kun mia edzo. Kvankam neniu el ni estas vere denaska esperantisto, la internacia lingvo plenigas niajn tagnoktojn kaj vivon.

*Kio estas via profesio?*
Mi estas lingvisto, diplomita instruisto pri Esperanto, la rusa kaj itala lingvoj, kaj krome ankaŭ pri matematiko. En Hungario mi laboris en universitato kiel trejnisto de lingvoinstruistoj kaj instruis inter aliaj interlingvistikon, gvidis Esperanto-fakon en Szombathely, kaj okupiĝis ankaŭ sciencinivele pri la propedeŭtika valoro de Esperanto.

*Kio interesas vin krom Esperanto?*
Multaj aferoj, legado, fotado, lingvoj kaj lingvolernado, sed ankaŭ la pentrarto de Vincent van Gogh pri kiu mi kreis Esperanto-kurson. Krome mi mem ŝatas fari mozaikajn artaĵojn. Sed por ĉio ĉi necesus multe pli da tempo ol mi fakte havas.

*Kiuj estas viaj agadoj en la Esperanto-movado?*
Mi estas aktiva espeperantisto de ĉ. 25 jaroj, dum kiuj mi gvidis pli ol 100 kursojn en trideko da landoj, trejnis instruistojn, pri kio mi laboras ankaŭ nun en la universitato de Poznan kaj kadre de mia porinstruista retejo www.edukado.net. De multaj jaroj kun mia edzo ni gvidas la paroligajn kursojn dum la Universalaj Kongresoj. Mi estas la ĉefrespondeculo pri la novtipaj KER-ekzamenoj de UEA, estis dum 15 jaroj vicredaktoro de IPR kaj estas ankoraŭ lingva revizianto de Monato.

*Via ŝatata libro?*
Nur unu mi ne povus nomi. Apud mia lito ĉiam kuŝas almenaŭ 10-15 libroj nepre kaj urĝe legendaj, inter ili poemkolektoj, biografiaj verkoj pri grandaj Homoj, dramoj, la leteroj de Van Gogh. La libro, kiun mi nun ŝatus relegi estas unu el la favorataj, mirinda libro pri la amo, verko de Sandor Marai, la angla titolo estas "Embers". La diversnaciaj tradukaĵoj havas diversajn titolojn, do mi ne scias kiun version traduki al Esperanto.

*Kiuj estas viaj proksimaj planoj?*
Fini la rekonstruadon de www.edukado.net kaj zorgi bone pri la 2400 membroj. Lanĉi RITE, la retan instruistan trejnadon, pli efike disvastigi la ekzamenojn kaj finverki la memorlibron pri Tiberio Morariu kaj lia agado en Svedio. Espereble tiun mi povos prezenti al vi dum la maja kongreso en Stokholmo.

Intervjuis: **Leif Nordenstorm**

---

Ekde tiu ĉi numero ni presas La Esperon en nova presejo kaj helsingborgaj esperantistoj dissendos la revuon. Ni antaŭdankas!

**Via redaktoro**

# Dags att anmäla sig!

## Kongresslokal: Cybergymnasiet nära Odenplan, Stockholm
## Tid: (13–)14–15 maj 2011

**Lokalen för årets kongress är Cybergymnasiet Odenplan Söder, som ligger centralt på Norrtullsgatan 6 nära station Odenplan på tunnelbanans gröna linje.**

För deltagare som anländer på fredagskvällen erbjuds program på Esperanto-Centro, Vikingagatan 24. Närmaste station med tunnelbanan är S:t Eriksplan på gröna linjen, eller med pendeltåg station Karlberg.

**Boende**


Hotellrum bokas och betalas direkt till hotellet (och ingår alltså inte i kongresspaketet).

Rum är preliminärt reserverade för deltagare i årskongressen med rabatterade priser på två hotell:

* Hotell vid Odenplan, 5 minuters gångväg från kongresslokalen, rum med bad, pris inkl frukost 695 kr/natt för enkelrum och 800 kr/natt för dubbelrum.
* Hotell vid Sveaplan, 10 minuters gångväg från kongresslokalen, enkla tvåbäddsrum som har ljusinsläpp från korridoren och delad WC och duschrum i korridoren (separata för damer och herrar), pris inkl frukost 495 kr/natt för en person, 545 kr/natt för två personer.

De preliminära reservationerna gäller så länge det finns rum kvar av dem som är reserverade, men längst till 10 april för hotellet vid Odenplan och 29 april för hotellet vid Sveaplan. Bokningskoder, telefonnummer och mejl-adresser till hotellen lämnas ut av kongresskommittén i samband med att anmälning kommer in.

Skicka in anmälan före den 5 april, för att hinna få uppgifterna i tid!



*Utsikt från Skansen mot Östermalm. Foto: Olof Pettersson*

## Mat

Luncherna på lördagen och söndagen består av färdiga salladspaket med bröd, smör och lättöl eller mineralvatten, och serveras i Cybergymnasiets matsal. På lördagskvällen serveras en trerätters middag på Turkiska salongen, som ligger tio minuters gångväg från kongresslokalen. På fredagskvällen finns inte någon förhandsbeställd måltid, men omkring Esperanto-Centro finns flera små restauranger.

## Hur anmäler man sig?

Kongresspaket med kongressavgift, lunch och kaffe på lördagen, middag på lördagskvällen, kaffe och lunch på söndagen kostar för medlem i Svenska Esperantoförbundet 880 kr.

Ungdomar som är under 20 år betalar 100 kr mindre i kongressavgift, och den som inte är medlem i SEF betalar 100 kr mer. Efter den 5 april tillkommer 100 kr på kongressavgiften.

Betala in till plusgiro **54454-4**, Esperanto-klubben i Stockholm. Skriv deltagarens namn och adress på talongen. *Skriv också telefon, eventuell e-postadress och eventuella önskemål om mat (t.ex. om du är vegetarian, eller har allergier) på talongen* eller skicka uppgifterna som e-post till sefkongr2011@esperanto.se.

Anmälan är giltig när kongressavgiften är inbetald. **Skicka in anmälan före den 5 april!**

## Anmälningsdatum och eventuell avbeställning

Anmäl dig helst senast 5 april. För anmälan senare än 5 april tillkommer 100 kr på kongressavgiften. Notera också att de preliminära hotellreservationerna upphör 10 april respektive 29 april. Eventuell avbokning av boende måste du göra själv. Kongressavgiften på 400 kr (efter 5 april 100 kr mer) återbetalas inte.

## Kongresskommittén

E-post till kongresskommittén:
sefkongr2011@esperanto.se
Kassör: Ulla Luin.
I kommittén ingår också Ingvar Enghardt, Soile Lingman och Gunilla Almér.
Kontaktperson i Esperantoförbundets styrelse:
Olof Pettersson.
Svenska Esperantoförbundet
telefon: 08-340800



*La Tvärbanan tramo en Stockholm.*
*Foto: Olof Pettersson*

**Sveda Esperanto-Kongreso**
**13–15 majo 2011 – Provizora programo:**

**Vendredo 13 majo, Esperanto-Centro**

| | |
|---|---|
| 16.00 -17.00 | Esperanto-Centro, librovendado ktp, taso da kafo, ankaŭ je 18-19 h. |
| 17.00 -18.00 | Esperanto-Centro, kurso pri terminoj de jarkunveno, eventuale ankaŭ je 19-20 h. |

Pluraj malgrandaj restoracioj estas en la proksimeco de Esperanto-Centro.

**Sabato 14 majo, Cybergymnasiet**

| | |
|---|---|
| 9.00 | Registriĝo kaj kafo |
| 10.00 | Malfermo de la jarkongreso<br>Post tio: Prelego de Katalin Kováts pri Tiberio Morariu |
| 12.00 | Lunĉo |
| 13.00 | Jarkunveno de Sveda Esperanto-Federacio |
| 15.00 | Kafo |
| 15.30 | Jarkunveno de la sveda sekcio de ILEI |
| 15.30 | Diskuto pri Esperanto-Gastejo |
| 16.00 -17.00 | Diskuto (en esperanto kaj la sveda): Ideoj pri aktivecoj en instruado kaj ekzamenoj de esperanto |
| 16.30 -17.15 | Sveda Esperanto-Instituto (jarkunveno por repr. de membro-organizaĵoj) |
| 17.15 | Jarkunveno de Eldona Societo Esperanto |
| 18.00 | Rondo Langlet (membroj) |
| 19.00 | Tagmanĝo en "Turkiska salongen" |

**Dimanĉo 15 majo, Cybergymnasiet**

| | |
|---|---|
| 9.00 | Kafo |
| 9.00 | Diservo, poste jarkunveno de la sveda sekcio de KELI |
| 10.00 | Prelegoj de Konstantin Andreev kaj Megan Case |
| 11.00 | Esperanto-Gastejo, jarkunveno |
| 12.00 | Lunĉo kaj fermo |
| 13.00 -15.00 | Provizora tempo por pliaj diskutoj |

# Hotelĉambro dum la jarkongreso?

Por vi, kiu aliĝas al la jarkongreso en Stockholm 13-15 majo 2011, estas provizore re-zervitaj kelkaj hotelĉambroj. Vi devas mem mendi kaj pagi al la hotelo. Atentu pri la lasta dato de mendo. La kvanto de ĉambroj estas limigita. La personaro de la hoteloj ne parolas esperanton.

*Hotel Oden, Karlbergsvägen 24, Tel: 08-457 97 00, info@hoteloden.se, www.hoteloden.se.*
1-litaj kaj 2-litaj ĉambroj kun bano, eblas mendi ĝis 10 aprilo. Kodo por mendo (bokningsnr) = G: 291 582

*Vanadis Hotell och Bad, Sveavägen 142, Tel: 08-30 12 11, info@vanadishotel.com, www.vanadishotel.com.*
2-litaj malgrandaj ĉambroj, uzeblaj ankaŭ por sola persono, necesejo kaj duŝo en la koridoro, lumo el koridoro anstataŭ fenestro, eblas mendi ĝis 29 aprilo. Kodo por mendo (bokningsreferens) = Svenska Esperantoförbundet

*(Tiuj ĉi informoj estas nur por tiuj kiuj aliĝas al la jarkongreso, kaj ne estas por publikigo en interreto)*

# Motion om stadgarna

En motion om ändring av Esperantoförbundets stadgar har lämnats in till styrelsen av Ulla Luin. Både vid årsmötet i Lesjöfors i maj 2010 och vid konferensen i Norrköping i oktober 2010 uttrycktes en tydlig önskan från medlemmarna att inte bara klubbrepresentanter ska ha rösträtt vid årsmötet.

Stadgeförslaget tar upp ett tjugotal punkter som behöver ändras i nuvarande stadgar, för att alla medlemmar ska ha rösträtt. I kommentarer till förslaget finns också en önskan att enbart sådana ändringar görs som har betydelse för rösträtten.

Stadgediskussioner tar mycket tid från annan och viktigare verksamhet.

Diskussion om stadgarna föreslås dokumenteras på diskussionsforum i Ipernity, tråden "Norrköping: Grupo 3, Rilatoj". I gamla tider hölls diskussioner enbart på möten, och den som inte kunde vara med på mötet fick fråga någon annan om vad som sagts. Detsamma kanske gäller även i nutiden, när det gäller "möten" på diskussionsforum på internet.

Adress till diskussionen: http://www.ipernity.com/group/sveda/discuss/32889.

**Ulla Luin**



*Ekster la Vasa-muzeo. Foto: Olof Pettersson*

# Språkcaféer i Vårby och Nacka

**Firandet av Europeiska språkdagen i form av ett stort språkcafé i Europahuset i Stockholm i september förra året har skapat följdeffekter i form av ytterligare – om än mindre – språkcaféer där vi deltagit och kunnat visa att esperanto "fortfarande finns" och används.**

I samband med invigningen av utställningen "Språken i mitt liv" den 14 oktober, där tävlingsbidragen från affischtävlingen till Europeiska språkdagen 2010 visades, hölls ett litet språkcafé på Internationella Barnkonstmuseet i Vårby gård. Linus Ganman och Olof Pettersson berättade om esperanto, svarade på frågor och visade böcker för besökarna som huvudsakligen bestod av skolungdomar. Några provade även att lära sig en fras eller två.




*Esperantobordet på språkcaféet i Nacka. Foto: Olof Pettersson*

Urvalet av böcker att visa kanske inte var det mest spännande för barn i låg- och mellanstadieåldern, men bara att synas och kunna berätta lite om språket kan förhoppningsvis bidra till några färre "Va? Finns det fortfarande?"-reaktioner i framtiden.

Även den 7 december hölls ett språkcafé där esperanto representerades av Olof Pettersson och Robert Smeds. Denna gång i Nacka gymnasium, tillsammans med ett antal av de andra medverkande organisationerna från Nätverket Språkdagen i Sverige, där även Esperantoförbundet ingår.

Besökarna här utgjordes av gymnasieelever och en och annan språklärare. De större språken, främst tyska, franska och spanska lockade förstås flest av eleverna, men flera lyssnade intresserat när Robert berättade om den praktiska nyttan av att kunna esperanto om man vill resa och bo billigt utomlands med hjälp av Pasporta Servo.

**Olof Pettersson**

# Programo en Stokholmo

La Esperanto-klubo de Stokholmo sciigis pri sia programo dum la klubkunvenoj. Kelkfoje la estraranoj sin prezentos. Estos studvespero, jarkunveno, kantvespero. Profesoro Hartmut Traunmüller rakontos pri "Apartigaj konstruitaj lingvoj (Medefajdrino, Eskaja ktp) Estos ankaŭ programo pri la enmigrinta lingvo la turka k.t.p.

# Martinus ordnar seminarium

Den andliga rörelsen Martinus som använder esperanto anordnade ett seminarium om språket 23 januari i Hälsans hus i Stockholm. Rubriken var "Esperanto - En viktig del av ett kommande världssamfund?"

I arrangemanget ingick både information om esperanto och en introduktion. Seminarieledare var Hokan Lundberg, Robert Smeds, Sonja Petrovic Lundberg.

# NWT om Forsmans bok

Nya Wermlandstidningen I Karlskoga rapporterade 12 januari om Lars Forsmans bok "Esperanto....över 50 miljoner träffar". Man skrev bland annat:

Numera är Lars Forsman pensionär men under åren 1985 till 2003 undervisade han i esperanto på Karlskoga folkhögskola. Under dessa år hade han elever från 39 olika nationer i sina klasser, bland annat från Kina och Japan.

För några år sedan bestämde han sig för att dokumentera tiden med esperanton. Till en början tänkte han sig någon form av folder men varefter han arbetade med projektet så växte det och lagom till bokmässan i Göteborg släppte han boken Esperanto....över 50 miljoner träffar.

Den 26 januari anordnar biblioteket och ABF en esperantoträff på biblioteket dit den som vill kan komma och diskutera språket.

SEJU

# Kurso en Gotenburgo

Post transloĝiĝo al Gotenburgo ĉi-somere, mi vagadis dum la aŭtuno en pensoj pri fari kurson. Tiam subite Siv Burell kontaktis min dezirante transpasigi la taskon, fari ĝuste komencan kurson, al mi. Mi ja jesis.

Siv jam kolektis kelkajn partoprenantojn kaj helpis min pri materialoj k.s. Hodiaŭ do estis la unua lekcio.

La mezaĝo de la partoprenantaro estas sufiĉe malalta.

**Arild Matsson**

# Katalin esperantisto de la jaro

La Ondo de Esperanto iniciatis en 1998 ĉiujaran proklamon de la Esperantisto de la Jaro. Al ĉi tiu projekto aliĝis reprezentantoj de diversaj tendencoj en la Esperanto-komunumo kaj sendependaj kompetentuloj.

La listo de la laŭreatoj

1998 William Auld (Skotlando)
1999 Kep Enderby (Aŭstralio)
2000 Hans Bakker (Nederlando)
Mauro La Torre (Italio)
Jouko Lindstedt (Finnlando)
2001 Osmo Buller (Finnlando/Nederlando)
2002 Michel Duc Goninaz (Francio)
2003 Dafydd ab Iago (Kimrio/Belgio)
2004 Helmar Frank (Germanio)
2005 Povilas Jegorovas (Litovio)
2006 Bertilo Wennergren (Svedio)
2007 Peter Zilvar (Germanio)
2008 Ilona Koutny (Pollando)
2009 Aleksander Korĵenkov (Ruslando)

La rezulto de la voĉdonado

En ĉi tiu jaro kandidatigantoj proponis 21 kandidatojn. Venkis Katalin Kováts, kiu ricevis 10 voĉojn.

Koran gratulon al Katalin!

**Halina Gorecka**

# Esperanto al Nikaragvo

Inter la 18a de februaro kaj la 15a de marto 2010 mi kaj Mallely Martínez Mateos (prezidantino de Meksika Esperanto-Federacio) vizitis Nikaragvon. Dum unu monato ni havis la okazon informi pri Esperanto kaj prepari ontajn vizitojn. Surloke nin helpis Eliette Esquivel, kiu komencis studi Esperanton nur fine de 2009 kaj kiun mi konatiĝis pere de Lernu. Dum la monato ni ofertis dimanĉan kurson en ŝtata institucio, prelegis pri Esperanto antaŭ ĉirkaŭ 20 instruistoj de mezlernejo, aranĝis du Esperanto renkontiĝojn kun Esperanto-parolantoj kaj amikoj kaj kreis retpaĝon por "Esperanto en Nicaragua". Krom multaj individuaj kontaktoj ni parolis entute kun personoj de 6 universitatoj (rilataj al lingvoj) kaj informis pri Esperanto (UNICA, Universidad Americana, UNAN, UCA, UPOLI kaj UENIC). En UENIC ni havis la okazon lasi flugfoliojn por la disdonado al la studentoj. En la UCA oni invitis nin prezenti Esperanton en la "Foiro pri kulturo kaj amikeco" (oktobro 2010) kaj oni promesis nin esplori la eblecon oficiale instrui Esperanton en la UCA.

**Martin Schaeffer**

# Libroj al naŭ bibliotekoj

Ĉiuj naŭ Esperanto-bibliotekoj, kiuj petis subvencion de la Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen de UEA, povos baldaŭ pliriĉigi siajn kolektojn de Esperanto-libroj. La estrarano de UEA pri kulturo Claude Nourmont kaj ĝenerala direktoro Osmo Buller asignis subvenciojn el tiu fondaĵo je la suma valoro de 1200 eŭroj.

La plej grandajn subvenciojn, po 200 eŭroj, ricevis Biblioteko Interlingvistika Fenikso el Venezuelo kaj Dokumenta Esperanto-Centro el Kroatio. Po 120 eŭroj estis asignitaj al Pernambuka Esperanto-Asocio el Brazilo, Kleruma Esperanta Klubo el Kubo, Biblioteko por Skoltisma Interkultura Pedagogio el Rumanio, Unuiĝo de Verdaj Amikoj el Togolando kaj Biblioteko Culbert el Usono. La bibliotekoj de Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj kaj Triesta Esperanto-Asocio el Italio ricevos ambaŭ librojn por 100 eŭroj.

Biblioteka Apogo Thorsen donas subvenciojn ĉiujare ekde 1997.

**Laŭ informoj de UEA**

# Kontakto kun nova vizaĝo

La socikultura revuo de TEJO, Kontakto, kompletigis la jarkolekton 2010 per la duobla numero 5-6 (239-240). Ĝi estas la unua kajero realigita de la nova redaktoro Rogener Pavinski. Krom bunta enhavo, ĝi estas grafike radikale alia ol antaŭe. Ok el la 28 paĝoj estas plenkoloraj. Same radikale Kontakto laste transformiĝis en 1992, kiam Francisco Veuthey redaktoriĝis. La logotipo dezajnita de li plu restas, ĉar en la voĉdonado en la retejo de Kontakto ĝi gajnis plej multe da subteno.

La individuaj membroj kaj patronoj de TEJO kaj aliaj abonantoj de Kontakto jam povas legi la numeron rete. Ankaŭ en 2011 ili povos legi ĉiun numeron rete tuj, kiam ĝi eniros presejon. Ankaŭ tiuj, kiuj ankoraŭ ne estas abonantoj, rajtas senpage konatiĝi kun la plene reformita revuo en la reto.

**Laŭ informoj de UEA**

# George Soros simpoziis kun UEA

Nekutime grandan publikan atenton ricevis la ĉi-jara simpozio de la Novjorka oficejo de UEA, kiun ĉeestis la mondfama miliardulo George Soros. Unu el la programeroj dum la simpozio estis prezento de angla traduko de la verko "Modernaj Robinzonoj", verkita en Esperanto de la patro de George Soros, kaj unue aperinta en la jaro 1923. Dum la simpozio montriĝis, ke George Soros mem junaĝe parkeris poemon de Zamenhof.

La titolo de la ĉi-jara Novjorka simpozio de UEA estis "De Zamenhof al Soros". La aranĝon partoprenis sepdeko da homoj.

**www.liberafolio.org**

# Kelkaj "Lingvaj respondoj"

En la frua historio de Esperanto L.L. Zamenhof en revuoj respondis al demandoj pri gramatiko kaj vortaro de Esperanto. La respondoj poste aperis en la libro "Lingvaj respondoj". Jen kelkaj ekzemploj:

**PRI "DAŬRI" KAJ "ĈESI"**
"Daŭri": esti plue, ne esti finita; "ĉesi": komenci ne ...i, aŭ komenci ne esti. El tiu signifo sekvas la reguloj de uzado de tiuj vortoj kaj de iliaj devenaĵoj "daŭrigi", "ĉesigi" k.t.p. Ekzemple: oni povas diri: "la laboro daŭras" (la laboro estas plue, ne estas finita), sed oni ne povas diri: "mi daŭras labori" (mi estas plue labori! mi ne estas finita labori!); ankaŭ ne estas bone diri (kiel mi mem bedaŭrinde faris kelkfoje): "mi daŭrigas labori" (mi igas esti plue labori!); oni devas diri: " mi daŭrigas mian laboron" (mi igas mian laboron esti plue) aŭ "mi laboras plue". Oni povas diri: "mi ĉesas labori" (mi komencas ne labori) aŭ "la pluvo ĉesas" (la pluvo komencas ne esti), sed ne estas bone forlogiĝi per la analogio kun "komenci" kaj diri: "mi ĉesas mian laboron" (mi komencas ne ...i aŭ ne esti mian laboron!); estas preferinde diri: "mi ĉesigas mian laboron" (mi igas mian laboron komenci ne esti).
*Respondo 49, Oficiala Gazeto, III, 1911, p. 294*

**PRI "MULTE DA" KAJ "MULTA"**
La formoj "multe da laboro" kaj "multa laboro" estas egale bonaj. Egale bonaj ankaŭ estas la esprimoj "mi konas tiom homojn" kaj "mi konas tiom da homoj", sed ne bone estus diri "mi konas tiom da homojn", ĉar en la lasta esprimo la formo "homoj" dependas ne de la vorto "konas", sed de la prepozicio "da", kiu ne postulas la akuzativon.
*La esperantisto, 1890, p. 60*

Estas diferenco inter "multaj homoj" kaj "multe da homoj": "multaj homoj" = diversaj homoj (ĉiu aparte); "multe da homoj" = granda nombro da homoj (kune).
Esperantisto, 1893, p. 96

## Kallelse till årsmöte för Svenska Esperantoförbundet

Svenska Esperantoförbundets årsmöte kommer att hållas lördagen den 14 maj kl 13.00 i samband med SEF:s årskongress på Cybergymnasiet Odenplan Söder, Norrtullsgatan 6 i Stockholm. Motioner till årsmötet ska ha inkommit till förbundsstyrelsen senast 2 månader innan årsmötet.
I enlighet med nuvarande stadgar ska ombud till årsmötet inkomma med fullmakter till förbundets sekreterare (Ann-Louise Åkerlund) senast 1 vecka innan årsmötet.
Årsmöteshandlingar kommer att skickas till klubbarna ca 1 månad innan årsmötet och de medlemmar som önskar en digital version kan meddela detta till sekreteraren.

Styrelsen

## Kallelse till årsmöte för svenska sektionen av ILEI

Lördagen 14 maj 2011
kl. 15.30 på
Cybergymnasiet,
Stockholm

Styrelsen

## Kallelse till årsmöte för Förlagsföreningen Esperanto

Lördagen 14 maj 2011
kl. 17.15 på
Cybergymnasiet,
Stockholm

Styrelsen



# Tiberio Morariu

***Unu el la prelegoj dum la Sveda Esperanto-kongreso temos pri Tiberio Morariu. Jen iom da informoj por ke vi iĝu scivolema.***

Tiberio Morariu (naskiĝis el geedziĝo de rumano kaj hungarino la 28-an de septembro 1901 en Kassa, nun Košice - mortis la 4-an de julio 1987 en Stokholmo, Svedio) estis rumana Esperanto-instruisto, redaktoro, kunlaboranto de diversaj gazetoj ktp.

Morariu estis Esperantisto de 1921 pere de A. Cseh. De 1921 li estis sekretario de la Esperanto-klubo en Cluj, de 1923 sekretario de Rumana Esperanto-Centro (REC) en Bukareŝto (Bucure ti). En 1924 li instruis Esperanton en la policoficira altlernejo en Bukareŝto. Morariu fondis en 1924 la Rumanan Esperanto-Instituton kaj estis ĝia direktoro. Li krome estis ĉefdelegito de Universala Esperanto-Asocio (UEA) por Rumanujo.
Li gvidis Cseh-kursojn en Rumanujo, 1922-1928 kaj en Svedujo, 1928-1931, 1933. Dum la sama periodo li gvidis plurajn kursojn por instruistoj en Stokholmo, Helsingborg kaj en Danujo (Odense). Post lia edziĝo al L. Andersson, ili ambaŭ gvidis kursojn en diversaj landoj. Lian instruistan kaj propagandistan sukceson montras la datoj: 100 kursoj, ĉ. 5000 kursanoj, 200 paroladoj (15 per radio).

Morariu kunlaboris al Esperanto Triumfonta, poste al Heroldo de Esperanto, Esperanto kaj Literatura Mondo (originalaj noveloj, skizoj kaj tradukaĵoj). Dume aperis liaj fidelaj, artaj kaj esprimriĉaj tradukaĵoj el la rumana literaturo: Niĉjo Mensogulo , Nobela peko , ambaŭ premiitaj de la Akademio de Esperanto, Sonorilo kaj kanono . Li estis premiita oratoro dum la Universala Kongreso 1931. (Ferenc Szilágyi en Enciklopedio de Esperanto, 1934).

Dum pluraj jaroj post tio li laboris por Esperanto en Svedio.

# Raportoj de Norrköping

**En La Espero 2010:5 kaj 6 ni raportis pri la konferenco en Norrköping 9-10 oktobro 2010 kaj pri laborgrupo 2, kiu okupiĝis pri la organizo de la Esperanto-mo-vado. Nun la vico venis al la raportoj de grupoj 1 kaj 3:**

**Grupp 1: Esperantorörelsens mål och medel**

Gruppen samtalade om esperantorörelsens mål och medel. Nedan följer några stolpar på samtalet. Kaisa Hansen och Anita Dagmarsdotter fick till uppgift att rapportera. Den som vill veta mer hänvisas till Ipernity.

*Marknadsföring*
Mål: Fler esperantister i Sverige.
Att allmänheten är medveten om att det finns ett språkproblem.
A: Esperanto finns i skolan om tio år.
A: Esperanto som första främmande språk inom 10 år.
A: Esperantos status höjt t. ex. via kurser på universitet inom 5 år.
B: Alla hört om E inom tio år.
C: Esperantostad i Sverige.
D: Esperanto i samhället.
Medel: Kontaktperson i varje kommun.
Alltid tillgängligt info-/faktamaterial.

*Utbildning*
Mål: Högre språklig kompetens bland esperantister, utbildning.
Esperanto i alla studieförbund.

*Information/kommunikation*
Mål: Underlätta internationella kontakter.
Medel: Fler på Ipernity.
Diskussionsmöten varje år.
Kontaktperson i varje kommun.
Grupp 1:s diskussioner kan man följa på:
www.ipernity.com/group/sveda/discuss/32472

**Grupo 3: Rilatoj inter loka klubo, nacia organizaĵo kaj membroj**

La tria grupo dum la konferenco en Norrköping, 9-10 oktobro 2010, ricevis la taskon diskuti pri: Rilatoj inter loka klubo, nacia organizaĵo kaj membroj.

Tomas Q Nilsson (Tomio) kaj Ulla Luin ricevis la taskon raporti pri grupo 3. Esence la raporto temas pri 5 punktoj, kaj pri ĉiuj el la punktoj necesos plia diskuto:


* La membroj (do ne nur klubaj reprezentantoj) de SEF havu la rajton voĉdoni en la jarkunveno (pri tio la grupanoj samopiniis).
* Ĉu voĉdonrajto por ĉiuj havas influon je la maniero pagi membrokotizon en la kluboj, kaj je la laboro de la kluboj?
* Ĉu membrokotizo necesas, kaj se jes, por kiuj aktivecoj necesas esti paganta membro, kaj je kiuj aktivecoj eblas partopreni sen pagi kotizon?
* Interretaj forumoj: SEF bezonas starigi interreta(j)n forumo(j)n apud tiuj kiuj jam ekzistas en la interreto. Kio estu la rolo de ĝi/ ili, kaj ĉu la estraro de SEF respondecu pri ili?
* Pri ŝanĝo de la statuto de SEF ni ne diskutis (sed ja eble estis subkomprenite ke tia ŝanĝo necesas).

Diskuto pri la temoj iom okazis en la "fadeno" pri grupo 3 en la interreta diskutejo Ipernity, kaj ankaŭ pri samaj principaj demandoj en aliaj fadenoj de la interreta diskutejo, krome en klubaj folioj, en klubaj kunvenoj, kaj en personaj diskutoj. Svedlingva propono pri ŝanĝoj de la statuto por voĉdonrajto por ĉiuj membroj en la jarkunveno estas prezentita al la estraro.

La adreso de fadeno pri grupo 3 en la interreta diskutejo estas: www.ipernity.com/group/sveda/discuss/32889

**La redakcio**


VIZAĜOJ
Novelaro 2000-2009




## Kion diras recenzintoj?

"La noveloj estas tre diversaj laŭ stilo kaj ankaŭ laŭ la enhavo. Ili tuŝas multajn temojn de la vivo, kaj ĉiutagajn kaj fantaziajn. (---) Certe ĉiuj legantoj trovos eĉ plurajn favoritojn inter ili."
*Mehdi Beatrix Stridh en La Espero.*

"...vere atentinda kaj liveranta adekvatan resumon de la Esperanto-literaturo 2000–2009."
*Valentin Melnikov en Ondo de Esperanto*

"Stiloj malsamaj, sed ĉiuj lingve senpekaj kaj same fluaj, kiel oportunas ĉe rakontado. Plia laŭdindaĵo estas eseeto, bedaŭrinde nur apenaŭ dupaĝa, pri la evoluo de la novelarto; en tiu disvolviĝo la nuna verko ne metas (nek celas meti) finan punkton, sed fotas la mallongan periodon de niaj lastaj dek jaroj. Entute, tre rekomendinda."
*Carlo Minnaja en Heroldo de Esperanto*

"la redaktistoj faris ĝenerale brilan elekton (---). Nepre aĉetu Vizaĝoj en via loka libroservo."
*Bjørn A. Bojesen en Beletra Almanako*

La tutajn tekstojn de tiuj ĉi recenzoj kaj aliaj vi trovos en www.esperanto.net/literaturo

29 noveloj
179 paĝoj
200 svedaj kronoj
plus sendkostoj

**Eldona Societo Esperanto**
**Esperantoförlaget**
Retadreso: eldona@telia.com
Telefon: 070-5850054